GISTO, FEB.2010
Strato Esperanto 880
95760-000 – Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br.
Donaca por ĉeestanto de la Verda Kafo
Krom foraj loĝantoj, R$ 1,00,
kun la celo plinombrigi la rondon.

.....

LONDONO
La gauĉa ambasadoro en Londono, nia diligenta samideano Lenio Marobin, jam anoncis sian venontan viziton al panjo kaj geamikoj, en la monato majo.La rondanoj vetas ke la fuŝulo denove mistrafos Verdan Kafon...hi...hi<

LIA REAGO (tra la retejo):
Kara, Vaske,Salutojn! - Dankon por la regula sendado de GISTO.Dum la lastaj 22 jaroj mi jam faris 22 vojagxojn al Brazilo. Kontraue al via informo, mi ne mistrafas la VKn: La VK mistrafas min(!). Eble cxi-foje la monto devas viziti la profeton..Gxis majo ĉe la kutima ĉuraskejo. - 73 – Lenio.

PAROLAS ANIMALO(Br, FalaBicho).
Hodiaŭ 11/02, mi aŭdis interesan intervjuon far Shejla Moŭra, (batalanto kontraŭ animala mistrakto) kun BABALORISXA'prezidanto de societa sekto, kiu mortigas animalojn dum la seancon, por konsumi la viandon en siaj ceremonioj. Li substrekis ke la mortigitaj animaloj servas por nutri la societanojn, ke per ties sango ili honoras altnivelajn estulojn, kies nomojn mi ne memoras. Shejla lerte pridemandis detalojn de la ceremonio. Malgraŭ ke li iel emis kaŝi la ĝustan agmanieron, li fine diris ke kvarpiedajn animalojn ili mortigas per tranĉilo kaj de birdoj oni tiradas iliajn gorĝon ĝis rompi la nukon...(sed, ĉu tiel oni celas pacon?). – La prezidento tamen forte substrekis, ke lia grupo neniel rilatas al satanismo. Li tre abomenis la konfuzon okazigitan far la kazo de la provinco Gojas', laŭ kiu fiviraĉo metis pli ol tridek nadlojn en la korpon de adoleskanta knabo.

EL LA BIBLIO
Hodiaŭ 12/02, Geova'-atestantino montris al mi, sub Genezo: "Dio blovis en ĉiun estaĵon sian spiriton, por ilin vivigi", same kiel Li faris en la homan figuron. – Same en Genezo 6 ie legeblas la Dian ordonon: ne manĝi sangohavajn bestojn. – Kristanaj infanoj eklernas, ke Dio estas ĉiopova, ĉioscia. Tial malfacilas kompreni, Lian trompiĝon, kiam la Biblio acertas ke Dio pentas esti la kreinta de homojn, pro la malbonoj kiujn ili faras – Konkludo: spiritistaj organizaĵoj delonge pravas asertante, ke bestoj enhavas.spiriton, alinome animon.

Daŭrigo - de Maraĵo')

Nu do, antaŭen flugas ni, de Santarem' al Belem'.La nevidebla prokrastilo, la daŭra orienta ventego ĉ.40Km/h, sur la nivelo 1200m, konstateblis. Saĝaj pilotoj elektas nealtajn flugnivelojn tamen ni ricevis la nivelon 1800m. Dumvoje la komandanto ricevis etan mesaĝon el sia hejmo: ĉio bonordas. Ĉiuhore plus 15 minutojn oni (Panair) dissendadis sekvon da meteaj informoj, internacikode, QAM = veterbultenoj de la urboj laŭlonge de nia irvojo. Ili

konsistas el chefaj informoj pri la vetero. vetero.Krom pluvetoj en Belem' preskaŭ ĉie, CAVU, mallongigo de la angla "Ceiling and Visibility Unlimited", certe ĉiu leganto jam sufiĉe scias la trudiĝeman lingvon kaj jam komprenis la signifon de "cavu". Bonegan prognozon ni havas por nia vojaĝo hejmen.!
250 Km for de Balem' ni devis flugi sub nuboj. Baldaŭ pluvetis kaj nia liva motoro ree iom vibris. Sub forta pluvo ĝi "tusis". Kmt.Heljo manipulis la regilojn laŭ rekomendoj en tiaj cirkonstancoj. Malgraŭ tio ankaŭ la dekstra maŝino igis nin senti vibradojn. La pilotoj klopodis, ke laŭeble ni sukcesos atingi la bonan aerodromon de Belem'. Domaĝe ambaŭ motoroj ne kontentige eltenis plenan plenpotencan funkciadon. Ĉirkaŭ 20% malpli da benzina nutrado pli malrapidigis nian kontraŭventan flugon. Bonŝance Belem' montris bonan veteron. La malsanaj motoro ne havis sufiĉan kapablon teni nian flugnivelon. Sur mapo ni trovis antikvan kampon kie aktivis sportavioj.

Heljo fidis ke tie ni sukcesos iel ajn surterigi nian paseron. Enestis nur ok pasaĝeroj.En la momento ne pluvis kaj mi riskis opinion: komandanto, provu refoje redoni iom pli da potenco, kun la celo flugi plus 130Km kaj atingi la sekvan flughavenon, tiun de Belem' Tion li faris. La chefa timeto estis ke, de la alto videblis pluraj, grandaj nigraj ŝtonojn. Kmt Heljo. proksimigis la avion al plej oportuna, divenata ventodirekto ĉar instrumentoj tie ja ne ekzistas. En la fina rekta fluglinio li diris, fiksu la rimenon kaj ŝirmu vin laŭ eblas.
La surgrundiĝo okazis pli milde ol atendite,
Okazis ke la tero ĝuste tie estis kvazaŭ tia de marĉo. La grandaj ŝtonoj envere estis grandaj termitmontoj. Do inter mortintoj kaj vunditoj, neniu. Tuj alkuris scivolemaj homoj, pretaj helpi, se bezone.Post radiokontaktoj, niajn pasaĝerojn baldaŭ samtage forportis Katalina-avio. Ĝi, amfibia maŝino surakviĝis en la riverbrako kaj haltis proksime. Per kanuo ĉiuj, enboatite adiaŭis nin.Ni situis en la vilaĝo Kuralinjo sur la insulo Maraĵo', en la deltego de la Amazonasrivero. – Post radiokontaktoj oni sciiĝis ke novaj motoroj, benzino kaj ripariga skipo atingos nin tra la rivero, **ne tre baldaŭ**. La loĝantoj batalis por havigi al si la rajton gastigi la flugistojn. Venkis la familio Bordalo, Sandoval Bordalo, pro tio, ke ĝi posedis surriveran dokon.ĉ 20m for de la riverbordo.Tie la skipo enloĝiĝis kaj devis dormi en hamakoj. Iam sinjoro Bordalo, nia gastiganto, sprita advokato, visite aperis kaj demandis "nu, kiel vi dormas ĉi tie?" Duono el nia grupo respondis: "sur la planko".- Tiam diris li:...«tion mi divenis, ĉar popoldiro asertas ke estas pli facile leprulo eniri la Ĉielon ol gaŭĉo dormi en hamako.

Ĉi estorio daŭros plus unu ĉapitron, se venos "poleksoj supren"

PRISEKSA SCIVOLO
Legeblas en porvirinaj periodaĵoj, ke la vizitantoj de vendobudoj por seksrilataj varoj nuntempe estas el 63% mezaĝaj virinoj. Preskaŭ la sama proporcio de vizitantoj kalkuleblas dum surparteraj defiloj kie aktivas inoj kun surpuba figfolio. Nuntempe multe pli ili kokras. Ĉu Dio rezignis rekonduki la homaron al la pratempa, bonmora konduto, post kiam la pastraro konsentas kunvivi kun pedofiliaj kolegoj anstataŭ transdoni la krimulojn al la Justico?

INTERESA EŬFENISMO
Por difini pigrulon, ie mi legis interesan eŭfenisman vorton "mensobezeco".

TESTO
Ĉu vi, trovinte sen kunteksto, la vorton ŜIARO, tuj scias kion ĝi signifas? Nu do, vi ne restadas la peza balbutulo.

PENTOFARO

Hodiaŭ, 19/02/10, la tuta mondo povis telespekti la publikan pentofaran aŭdiencon far la fama golfludisto Tajgers Vuds, kiun ĉeestis unu el liaj amatinoj. Ŝi estis plencele fokusita, eĉ verŝis kelkajn larmojn, verŝajne tre sincerajn.

SEKSKLINIKO Far D.Koimbra(ZH)

Kiel procedas kliniko por liberigi homojn el la obseda penso pri sekso, en kazo simila al tiu, kiun gastigas la sportiston Tajger Vuds, en Usono? Certe okazas kuracado tre specifa, evidente tre sofisma, multe pli malfacilas konvinki personon forlasi la seksumadon ol drogojn aŭ alkoholon. Envere la plejmultaj ne drinkas sed...sekso, pensu pri ĉi mondo de Dio. Okazas tertremoj, konstruaĵaj disfaloj, okazas ĉiuspecaj klimataj detruoj, mortigoj kaj miloj da malsanoj, kofroj falas surkape de homoj, sencelaj kugloj, venenaj insektoj, leonoj kaj tigroj voras homojn. Ĉiumomente homoj mortas laŭ diversaj manieroj sed, malgraŭ ĉio la tutmonda homaro nur kreskadas. Kial? Pro la populareca seksumado. Ĵus nun, ekzakte dum vi legas la literon mo de momento, en precisa momento iu ie baraktas en la ŝlimo, seksummas, unu virino ĝemetas pro profunda plezuro, iu viro pensas: “indas rakonti ĉi-raran momenton al nia grupaĉo...” Homoj seksumas en iu ajn momento. Veras ke sekso posedas enorman prestiĝon kaj senliman adeptaron malgraŭ la klopodo far la katolika Eklezio kaj de la (ge?)femalistoj. Tial do konvinki personon ke sekso malbonas estas tasko monstre granda. Kiel la klinikistoj plenumas tion? Kiel ili sukcesas, ke iu ne plu havu emon iumete seksumi? Mi supozas, ke tie ili manĝigas intestojn, tripojn. Sciatas ke inoj fariĝas senapetitaj se ili manĝas en ĉuraskejoj sed viroj, tute ne. Do tie devas esti manĝaĵo tute malmotivanta. Intestoj. Kiu manĝas intestojn malapetitas sekson dum pluraj tagoj. Ankaŭ la arkitekturo de la ejo gravas. Devas esti ne inspiriga. Sed se vi estas la arkitekto, memoru ke ne malmultaj virinoj aprecas seksumi en strangaj lokoj. Medioj. ŝajne malstimulaj, estas kontraŭe, stimulaj por virinoj, tombejo, lifto, konfesejo, predikejo, bicikla stirilo, bankaj giĉeto, riparejo de teleregiloj kaj stratkruciĝoj. La ideala kliniko nepre estu ejo kie neniu, absolute neniu sentu sin ekscitita. Kiu? Kion scias mi...eble klubo de patrinoj, vartejo, framasona kunsido, parolado pri konstruado,, kurso de komputila muntado aŭ leciono pri statistiko. – Nepras ke la inoj de la kliniko uzu tenisŝuojn kaj tiujn longajn lozajn pantalonojnk kiujn la virino lastatempe uzadas, perfektaj por enuigi pri sekso aŭ uzi tiun pantalonon kaj pantoflojn kun la dikfingro ekstere aŭ tute platajn pantoflojn. Aldone, hararon buloforman kompreneble. L aĉirkaŭmedia muziko estu de Simone, la ino kiu prononcas tute malfermajn E kiel en fElicidade. TV estu tiu de la Kongreso. Filmo, iu ajn usona romankomedio. – Oni elstarigu: aldonaĵo por la postresaniĝa periodo. La malbono kio postrestas en li samas al alkohola fikutimo. Abstimulo devas eĉ ne ĝui likorbombonon aŭ li/ŝi refalos en la drinkemon. Tial Tajgers, la seksemulo, ne povas karesi genuon, ne rajtas preterpasi la Atlantikan fiŝistan terason, ne rajtas spekti ĝinastikadon. Ĉu la plej elstara golfisto de la mondo eltenos tion? Homo tiel fama, kun tiel fama bankkonto kapablas rezisti la tentojn? Mi esperas ke jes. Mi restos atenta je lia kuracado por ke Tajgers fine liberiĝu de seksemo kaj tenu sin pura, nemakulita por la tuta, tuta vivo.

OLIMPIKAJ SKIADOJ/2010..

Tiu belega spektaklo estis motivo por ke mi hodiaŭ surpaperigu kvarpaĝan Gisto, por la memoraĵo de la postvivanto

ĈINIO brile elstariĝis en la Vankuveraj Olimpikoj chefe pro ĝiaj skiistoj. Mi devas konfesi ke mi, dum la artprezentado, devis forte kaj ofte pinĉi min, por certiĝi ke mi vekas, ne sonĝas. Ili plenumis artifikaĵojn nekredeblajn! Supren ĵetis siajn inajn kunulojn, kirle flankenĵetis la fraŭlinon kaj ili aplombe "surteriĝis" sur la ege gliteman glacian surfacon kaj daŭrigis gaje, ĝoje kaj ridetemaj sian planitan taskon. Rezulto: du ĉinaj paroj sur la venkista podio. Se ankoraŭ ekzistis unu homo sur la Tero kiu subtaksis geĉinojn, mi pensas, tiu vaniĝis. Mirindaĵo! Aliaj elstaraj duoj, kiujn mi varmege aplaŭdis estis la danca skiado far la usona paro. Tre, tre utilis la elekto de tango-kadenco por la skiada prezentado. Tango ja estas ĉarma ritmo por subteni tiun sportajn prezentadojn.

Nur ne plene plaĉis al mi la fakto ke TV-Record, en siaj kutimaj programeroj rigore obeas la nacilingvajn granmatikaĵojn, sed,pere de brazillingva prezentanto neglektis la prononcadon. Li ofte trouzis, kiel faras TV-Globo, la anglisman prononcon de la vortoj perfOrmance anstataŭ .diri la ĝustan perfomAnce ...kaj aliajn terminojn.

VERKADA PRAKTIKO

Se nia kara GEA-prezidanto konsentos, mi proponos min por iam sabate vespere, en la GEA-sidejo, gvidi interesatojn al kiuj plaĉas pli lertigi sin en skribado de letero kaj/aŭ etaj mesaĝoj . Mi atendas anoncojn, por ke oni tiucele marku, per telefono, Internet aŭ letero, tagon/horon.

Ridetu.

PASTRO x RABENO

Dum festmanĝo sidis kune katolika pastro kaj rabeno. La pastro, por iel provoki sian profesian kolegon, afable ŝovis pladon kun bele rostita porkido antaŭ li kaj proponis: provu, kia delico!

- Ĉu vi ne scias ke mia religio malpermesas manĝi porkidon?

- Pastro: Kia stranga religio...!

Je la adiaŭaj vortoj la rabeno krome aldiris:

- Rekomendojn al via estimata edzino.

- La pastro miras kaj respondas:

- Vi ignoras ke mia religio malpermesas edziĝon al pastroj?

La rabeno: - kia strangega religio!!- "manĝi" virinon estas delico...sed, se vi preferas porkidon, nu do, frandu ĝin...

MODESTECO

La fama Ajnstajn, kiam pro iu motivo devis citi sian mondfaman Teorio de la Relativeco, kutimis diri:tiu teorio kies nomon mi havas la honoron uzi.

EN INFANĜARDENO

Etulino, diru al mi vorton kiu komenciĝas per la litero-S.

- Hieraŭ.

- Hieraŭ?...sed, ĉi vorto ne komenciĝas per la litero so.

- Kial ne?...hieraŭ estis sabato.

INTER FRAŬLINOJ.

- Mia fianĉo vizitas Bonaeron. Li fiere anoncas al ĉiuj ke li baldaŭ edziĝos al la plej bela fraŭlino en la mondo.

- Sed... kia fripono! Post tiom longa kompromiso kun vi!

SUROGATO

- Mi rimarkis ke vi flegadis du hundojn, tri kanariojn, katon, simion kaj papagon. Lastatempe mi ne plu vidas ilin. Kio okazis?

- Simple. Mi edziniĝis, mia edzo anstataŭas ĉiujn.

INTERPRETO

Infanajn preĝojn Dio aŭskultas ridete, tiun de kredantoj, kun plezuro; tiun de hipokretuloj, rezignoplene.

ENKETO

Bonvenas datosugestoj por marta komuna, verda tagmanĝo, centraurbe de POA. Oni atendas minimuman nombron de. dek interesatkoj.